



Saluto al la SAT- Kongreso

Karaj ĉiuj partoprenantoj de tiu ĉi SAT-kongreso, en la nomo de Ĉielarka Frakcio, japanlingva peranto NISHIKAWA Satoru elkore salutas vin okaze de nia jara kongreso kiu ĉi jare okazas en Parizo.

Nu mi volus paroli iom pri Japanio. Kiel eble vi scias, nun, japana reakcia registaro intencas malbonŝanĝigi japanan konstitucion. Tio estas tre terura! Per tiu malbonŝanĝo, iuj homoj celas ŝanĝigi Japanion el la lando de “Nepre ne milita”, al “Volonte milita”. Sed ni ne malesperas. Ĉar partaj partioj kaj multaj civitaj grupoj movadas por vera mondpaco. Ni devas konservi la konstitucion japanan speciale la 9an artikolon, en kiu estas skribita, ke ni ne militos kaj ni ne havos armeon.

Ankaŭ pri ĉielarka afero ---sekso kaj genro---, japana reakcia registaro kaj kelkaj ŝovinismaj politikaj partioj kontraŭas sciencan kaj entutan seks-edukadon, atakante la ideon “gender-free”, t.e. ideon pri genra sendiskriminacio. Sed ni ne malesperas. Seksminoritatoj kiuj kandidatiĝas en la politika elektado pli kaj pli multiĝas en Japanio. Plie, okazloko de Fierecaj Paradoj kaj Ĉielarkaj Filmaj Festivaloj pli kaj pli dise multiĝas en tuta lando. Tio estas tre bona fenomeno ne nur por seksminoritatoj sed ankaŭ por ĉiuj homoj kiuj batalas por pli egala kaj libera rajto pri sekso.

En tiu ĉi jaro, unu kamarado el nia Frakcio rekte subtenas Ĉielarkan Marŝon en Sapporo (Norda urbo en Japanio) kaj planas vojaĝi tien por kunmarŝi. Ni ne rezignu movadi kaj certe trovi vojojn por bona solvo.

Denove ni deziras al vi sukcesan kongresumadon kaj agrablan restadon en Parizo.

NISHIKAWA Satoru el Hiroŝimo.

NI LEGIS POR VI...

Andreas Künzli:

Universalaj Lingvoj en Svislando

eld. Svisa Esperanto-Societo kaj Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale, 2006.

1129 paĝoj, 24 cm. Prezo 66 € ĉe libroservo de UEA.



Unua ŝoko: ni ricevas 6-centimetran dikan libron, pli ol milpaĝan, pli ol unu-kilograman, en malgranda litertiparo Times New Roman 10, sur belega papero, kiu pli similas al vortaro, ol al niaj kutimaj eldonaĵoj tiutemaj. Kovrilpaĝoj tre belaj, en moderne profesia aspekto... vere tre brila prezentado.

La titolo indikas la entenon: la historio de Esperanto kaj de aliaj planlingvaj projektoj en unu lando (nur unu, bedaŭrinde, sed gravega lando, kie vivis gigantoj, kiel Privat, Hodler, Stojan... pintaj esperantistoj, kiel René de Saussure, Baur, Gacond, Piron... lando en kies ĉefurbo okazis la unua perdita batalo por politika agnosko de Esperanto en Societo de Nacioj, lando kiu nestis la komencan UEA, la aperon de CDELI, de Kultura Centro Esperantista, de PEN-Centro, de Esperanta Civito...). Pri ĉiuj tiuj temoj aŭ personoj abundas informoj en la libro. Rimarkinde estas la tekstoj de du el la plej grandaj malamikoj de Esperanto, Gonzague de Reynolds, kaj Charles-Albert Cingria; precipe ĉi-lastata montras teruran malamikon kontraŭ

nia lingvo kaj kontraŭ esperantistoj; nepre legu lian opinionon, ĝi helpas kompreni, ke la nesufiĉan disvastiĝon de Esperanto ni ne prikulpas, kiel ni tro ofte emas pensi, sed ankaŭ ŝuldas al tre akraj malamikoj eksteraj, pli nombraj, efikaj kaj potencaj, ol ni emas kredi.

La enkonduko kaj pluraj partoj en la libro estas en pluraj nacilingvoj: angla, franca, germana, itala, eĉ romanĉa... ĉar ĝi ankaŭ celas ne-esperantistan publikon; samidee aperas ĉe la fino resumata gramatiko de Esperanto kaj plurlingva vortolisto al- kaj el esperanto por faciligi la legadon de nia lingvo al nur nacilingvanoj.

Kompreneble kelkaj partoj el tiu verkego estas malpli interesaj por ne-Svisoj, ekz. la detala historio de la Svisa Fervojista Asocio, aŭ la amaso da esperantistoj nekonataj eksterlande; sed tio ne povas esti riproĉo en libro ĝuste dediĉita al tio.

Male abundas nepre necesaj tekstoj tre malfacile troveblaj aliloke, kiel la dokumentoj por kaj kontraŭ E-o en la Societo de Nacioj, kiel la agoj kaj faroj por interlingvaj projektoj de tre konataj interlingvistoj (R. Berger, A. Matejka...) kiuj pasis de unu planlingvo al alia en senhalta “Esploro al la perfekta lingvo” kiel dirus Umberto Eco.

Oni ankaŭ trovas kompletajn informojn pri aktualaj problemoj de la esperantistaro, ekz. plurajn paĝojn pri la Esperanta Civito, kiu naskiĝis en Svisujo; tamen oni kompletigu ilin per la legado de la intervjuo de Andreas Künzli en la Junia-2007 n°de “La Ondo de Esperanto”, kie li eble pli familiare kaj libere donas sian personan opinionon.

Ne eblas resumi en kelkaj linioj ĉiujn interesojn de tiu belega verko, kiu jam iĝis unu el la ne-malhaveblaj elementoj de ĉiu serioza biblioteko esperantista.

Dankon kaj gratulon al A. Künzli, ge-Gacond, A. Sandoz-Giroud kaj al ĉiuj urbaj funkciuloj kaj civitanoj de La Chaux-de-Fonds kunlaborintaj aŭ helpintaj en tiu komuna minejo da trezorinformoj.

Johan' Luko